EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo

- AMO pluiras virtuale!
- AMO 64 v – la lasta prelega dissendo
- Regiona agado dum la pandemio
- Małgosia Komarnicka

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-28 sendita el Budapeŝto, la 16an de majo*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Kompletigo de la materialoj por AMO 64

Jen la lasta prezentaĵo el la 64a AMO seminario, okazinta antaŭ ses tagoj. Unuafoje en la historio de la programo, ni ricevis kaj povis dissendi ĉiujn el la prezentaĵoj. Ili pluiras al <aktivulo.net> por afiŝigo.

Pluraj aspektoj de la agado de tiu regiona asocio en Pollando rilatas al la faka agado – universitata agado, aktivecoj en la rotaria movado kaj nia Faka Asocio RADE, krome pri instruado pere de la revuo *Juna Amiko*.  En la foto nova foto de la prezentinto.



**Unua konkludo:** Multo valora okazas en grupiĝoj, kiuj ne estas establitaj landaj aŭ fakaj asocioj, kaj pro unuopuloj, kiuj apenaŭ trovas lokon en la tradicie strukturata movado.

**Dua konkludo:** La nuna pandemia tempo elstarigas kaj vidigas tendencon, kiu jam delonge ekzistas kaj kreskas: komputika konektiteco malfermas la vojon al unuopaj motoroj kaj sendependaj grupoj por plenuni valorajn servojn kaj informadon pri Esperanto. La nuna epoko vidigis tiujn hiperagemajn homojn, kaj permesis al ili kontakti unu la alian kaj formi potencajn aliancojn.

**Tria konkludo:** Prosperos eksterproporcie tiuj tradiciaj asocioj kaj organizoj, kiuj agnoskas kaj subtenas la agadon de tiuj aktivuloj kaj memstaraj agantaj centroj. La pli suplaj asocioj enprenos la energion de agemuloj kaj tiel fortigos samtempe ilin kaj sin.

======= Vortoj: 210 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.